



AMERIKA

ESPERANTISTO



34

1

Jan.-Feb., 1925

	Page
La Morto de S-ino Klara Zamenhof	1
XVII Universala Kongreso de Esperanto en Genevo	2
Why Esperanto?	2
Singular Things in Plural	3
Fratecaj Proponoj de Niaj Japanaj Samideanoj	3
Serĉas Internacian Negocadon	4
"Reklamo"	5
Esperanto at the Fairs	6
Esperanto and Medicine	7
Conference for Science and Technology	8
Book Reviews	9
Radio	Edward S. Payson 9
What is the Most Attractive Feature of Your Group Life?	E. J. Meriam 11
News and Notes from the Central Office	14
"Skribu Internacie"	E. J. Meriam 16
	Herbert M. Scott 18

AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN OF THE ESPERANTO ASSOCIATION of NORTH AMERICA, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the
International Auxiliary Language, Esperanto.

Yearly Memberships: Regular \$1.00; Contributing \$3.00; Sustaining \$10.00; Life Members \$100.

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.
Group Charter—\$1.00.

BERKELEY, CALIF.

Berkeleya Esperanta Rondo.—Vinton Smith, Secy., 586 Lake Park Ave., Oakland, Calif.

OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo.—L. D. Stockton, Secretary, 420 15th St.

SAN FRANCISCO, CALIF.

Esperanto Association of California, Inc.—Meets first Tuesday evenings, Rooms 309-311 Chronicle Bldg., San Francisco. M. D. Van Sloun, Secretary, 1160 Fell Street.

MONTREAL, CANADA.

Montreal Esperanto Association: Meets each Monday evening at 8 in Room 25, 747 St. Catherine St., West, Sek. G. E. Warner.

OKLAHOMA CITY, OKLA.

La Oklahoma Esperantista Societo kunvenas dimanĉe kun Arto kaj Scienco Klubo, 2501 W. Ave. "G", RR6, Box 156, Oklahoma, Okla. C. R. D. S. Oakford, Prez.

WASHINGTON, D. C.

Kolumbia Esperanto-Asocio, third Thursday October to May; Kabea Klubo, other Thursdays throughout the year, at 8 P. M. Class, Thursday, at 7.30. All at 1918 Sunderland Place.

CHICAGO, ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park.—Jaroslav Sobehrad, Secretary, 5625 23rd Rd., Cicero, Ill.

La Esperanto Oficejo, 1669 Blue Island Ave.—Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate.

ROCKFORD, ILLS.

Scandinavian Esperanto Institute, 1217 7th Ave.

BOSTON, MASS.

Boston Esperanto Society, 507 Pierce Bldg., Copley Sq.—Meets Tuesdays, 7 P. M. Miss M. Butman, Secretary.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society.—Business Institute, every Friday, 8 P. M.

BALTIMORE, MD.

La Baltimore, Md., Esperanta Rondeto meets 1st and 3rd Wednesday evenings in month at Md. Academy of Sciences.

PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society.—Mrs. E. C. Flint, Secretary, 16 Sherman St.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 2916 East Grand Blvd.—Open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A. M.-9 P. M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P. M.

La Pola Esperanto Asocio, 1507 E. Canfield Ave.—B. Lendo, Sek., 3596 29th St.

TOPEKA, KANSAS Esperanto Association. Prez. Capt. Geo. P. Morehouse. Sek-iino, S-ino Lida R. Hardy, 1731 Lane St. Kores-Sek-iino, F-ino Leone Newell, 635 Watson St.

NEW YORK CITY, N. Y.

The New York Esperanto Society.—Miss L. F. Stoeppler, Sec., 63 West 94th St. The Barĉo, or Esperanto Supper, is held on the first Saturday of each month, 6.45 P. M. at Hotel Endicott, 81st St. and Columbus Ave.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

WEEHAWKEN, N. J.

Hudson County Esperanto Society, Box 32, Weehawken, N. J. Headquarters: Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J. Meetings: The second Tuesday of month. Secretary: Mr. O'Brien, 6 Hageman Place, West New York, N. J. Literatura Klaso, under direction of J. J. Sussmuth, every Tuesday except second. Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J.

CLEVELAND, OHIO.

The Cleveland Esperanto Society, Hotel Winton, every Monday, 8.00 P. M. S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

TORONTO, CANADA.

The Toronto Esperanto Society meets every Sunday at 4 P. M., and classes are held every Thursday at 8 P. M., in the school room of the Society of Friends, 113 Maitland Street.

Honorary Secretary, Sro. A. P. H. Rollason, Box 123, Terminal A, Toronto.

PHILADELPHIA, PA.

Philadelphia Esperanto Society, Henry W. Hetzel, Sec'y, West Phila. High School for Boys. Barĉo and monthly meetings on third Tuesdays at Hotel Hanover, 12th and Arch Sts. (Barĉo 6.45; business meeting 7.45 P.M.) Centra Loka Oficejo, 133 N. 13th St. (Librovendejo de Peter Reilly, Vic-Delegito de U. E. A.)

Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanto Stelo de Polujo.—Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 509 N. York Ave.

PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art.—J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists.—S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Ave., 3rd Tuesdays, 8 P. M.

ST. PETERSBURG, FLORIDA.

Amikeco Rondo meets Tuesdays 4.00 P. M., Fridays 8.00 P. M. E. E. Owen-Flint, Sec. 211 7th Ave. North.

Amerika Esperantisto

ORGANO

de la

ESPERANTA ASOCIO DE NORDA AMERIKO

507 Pierce Bldg., Copley Square

Boston 17, Mass., U. S. A.

Vol. 34.

January-February, 1925.

No. 1.

LA MORTO DE S-INO KLARA ZAMENHOF.

Bedaŭrinda estas la forpaso de la edzino de nia Majstro, kiu ankaŭ estis la fratino de nia ŝatata novjorka samideano, Joseph Silbernik.

Ni elĉerpas la jenan de decembra "Esperanto" (Privat):

Doloriga novaĵo malgaje frapis la tutmondan esperantistaron dum ĝi festis la kutiman datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof. Ĵus mortis la 7an de decembro la edzino de nia Majstro pro longa, suferiga malsano el kancero kaj post vana operacio. Atinginte la aĝon de 61 jaroj, sinjorino Klara Zamenhof estis bone konata de la esperantistoj, ĉar ŝi regule partoprenis ĉiujn niajn kongresojn malgraŭ la granda lacigo de l'vojaĝo kaj la forta emocio de l'rememoroj. Ĉiuj ne nur respektis sed tutkore amis ŝin pro ŝia digna simpleco, sincera modesteco kaj fervora intereso en ĉiuj flankoj de nia movado.

Atentinda estas le sekva de la "Heroldo de Esperanto" (10 jan.) en kiu oni priskribis la vivon de D-ro Zamenhof:

".....Ludoviko ekkonis ĉe gesinjoroj Levite ilian parencinon el Kovno, F-inon Klara Silbernik, kiu gastis en Varsovio. La gejunuloj ekplaĉis al si, kaj en 1887 ili edziĝas. La juna edzino baldaŭ entuziasmiĝas je l' ideo, kaj post la interkonsento kun sia patro s-o Aleksandro Silbernik fordonas tutan sian doton por la presigo de l' "Unua libro." En la strato Muranowsko loĝis la juna paro, kiam alvenis de l' presisto (s-o Kelter) la unua broŝuro. Gojo, feliĉo, entuziasmo. La bopatro ne nur permesis, sed eĉ subvenciadis multege el sia poŝo por la pluaj eldonoj. En tre mallonga tempo s-o Silbernik eklernis la lingvon, kaj baldaŭ li estis unu el la unuaj parolintaj Esperanton kun nia Majstro."

XVII UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN GENEVO,
3-7 AUG. 1925.

The provisional program includes addresses by several professors in connection with the Somera Universitato en Esperanto:

Laŭ aranĝo kun la Internacia Universitato fondita de S-roj Otlet kaj Lafontaine en Bruselo, okazos en Genevo internacia universitata semajno en Esperanto de la 1a ĝis 7a de aŭgusto 1925. Konataj profesoroj el diverslandaj universitatoj prelegos en Esperanto pri gravaj temoj de internacia juro, filozofio, filologio, Historio de Esperanto, pedagogio kaj psiko-analizo. En la du lastaj kampoj okazos prelegoj de la famaj psikologoj P-ro Pierre Bovet kaj Charles Baudoin, kiuj ambaŭ lernis nian lingvon kaj nun parolas ĝin flue.

Other features of the program are such as we naturally expect: Diservoj; ĝardenfestoj; laborkunsidoj; ŝipekskurso sur Geneva Lago; vespera teatro; balo; ekskursoj al svisa montaro; ktp. An attractive event, which thousands of us would like to attend. Go if you can, and get the details by writing to XVII Universala Kongreso de Esperanto, 12 Boulevard du Théâtre, Geneva, Switzerland.

WHY ESPERANTO?

Every issue of Amerika Esperantisto helps to answer the question, "Why Esperanto?" Let us, however, call attention to the different articles in this issue as illustrating why we have the language and what it is for. Of the first two articles we may simply say that Esperanto is much indebted to S-ino Zamenhof, as will be seen by reading what we have printed, and that the annual congresses are extremely important as informing us of what is going on and what the advocates of Esperanto are trying to do.

The subsequent articles are numbered: (I), "Singular Things in Plural," telling its own amusing story; (II), a proposal from Japan to promote friendship between our two nations, and a declaration from Japan signed by ten different student groups in the interest of the League of Nations, both impressive as showing how important the Japanese regard the language; (III), the ambition of samideano Paul Plate, to establish an international business with people who are ready to go about it seriously; (IV), the new journal devoted to advertising called, "Reklamo," having in its first issue considerable emphasis on the advertising of tobacco; but followed by (V) the announcement of "Verda Kruco" in the interest of the anti-tobacco movement. What next? Next we have: (VI), the circulars of the fairs in Leipzig and Danzig, the first of these being an event in history which dates back to 1268, which in recent years has paid much attention to inviting Esperantists to come; (VII), the attempts of the medical profession to introduce the language for its in-

ternational interests, our quotations being from three medico-Esperanto sheets; (VIII), the international conference for the use of Esperanto in scientific and technical circles to be held in Paris in May; (IX), Book Reviews by our eminent samideano, Edward S. Payson; (X), Radio; (XI), "What is the most attractive feature of your group life?"; (XII), News and Notes from the Central Office, and, (XIII), "Write Internationally" (which is to think internationally, obviously worth while). Also there are unclassified articles on pages 8 and 17, which tell their own stories.

All these answer—do they not!—from various angles the question "Why Esperanto?" Some of them we print in English, some in Esperanto, some in both, according to circumstances; but we hope that our readers will consider every one of these carefully, regardless of the language in which it happens to be printed.

I.

SINGULAR THINGS IN PLURAL

We'll begin with a box and the plural is boxes;
 But the plural of ox should be oxen, not oxes.
 Then one fowl is goose, but two are called geese;
 Yet the plural of moose should never be meese.
 You may find a lone mouse or whole lot of mice;
 But the plural of house is houses—not hice.
 If I speak of a foot and you show me your feet,
 And I give you a boot, would a pair be called beet?
 If one is a tooth and a whole set are teeth,
 Why shouldn't the plural of booth be called beeth?
 If the singular is this and the plural is these,
 Should the plural of kiss be nicknamed "keese"?
 Then one may be that and three would be those,
 Yet hat in the plural would never be hose;
 And the plural of cat is cats, not cose.
 We speak of a brother and also of brethren;
 But though we say mother, we never say methren.
 The masculine pronouns are he, his and him;
 But imagine the feminine—she, shis and shim.
 So, our English, I think we all will agree,
 Is the most wonderful language we ever did see.

—Czar Kazzem.

II.

FRATECAJ PROPONOJ DE NIAJ JAPANAJ SAMIDEANOJ

Amikeco Inter Japanujo kaj Usono

Konsiderante ke amikeco inter Japanujo kaj Usono jam havis longan historion, donante gloran rezultaton kaj reciprokan feliĉon al ambaŭ nacioj,

Konsiderante ke la Enmigrada Leĝo datumita la 24an de Aprilo, 1924, jetis neagrablan sentimenton en tiun ĉi dekoran amikecon,

Konsiderante ke la nuna stato inter la du ŝtatoj ne estas dezirinda,

Ni, japana Esperantistaro, uzante la bonan okazon de nia XII-a Kongreso, proponas al ni mem kaj al vi, Usona Esperantistaro, ke ni kiel eble plej multe klopodu por la bonigado de tiu ĉi nedezirinda stato inter Japanujo kaj Usono, pro la internacia frateco, kiun nia amata Majstro L. L. Zamenhof al ni predikis.

Komuna Deklaracio Pri Ligo de Nacioj

Dum la longa historio de l' homo, idealon ĉiam perfidis realeco, la espero de l' homaro restadis neefektivigita.

Ĉu la paco eterna estas nerealegebla espero kaj ĉu la justeco inter nacioj estas vana idealo produktata de homa revo?

La Ligo de Nacioj estas do unu bona akompananto sur la malfacila vojo kondukanta al la celo de l' homaro. Eĉ se ĝia organizo estus ankoraŭ ne perfekta, eĉ se ĝia forto estus ankoraŭ ne sufiĉa, ni povas protekti kun profunda kredo la porpacan organizadon tutmondan.

Ni fondis Studento-Grupon de Japana Asocio por la Ligo de Nacioj en niaj lernejoj, ĝuadis la idealon de eterna paco kaj energie penadis disvastigi la internan ideon de l' Ligo de nacioj. Nun, la samidealaj, samcelantaj Studento-Grupoj kore sin kunligis por plifaciligi la pacan movadon kaj organizis la Federacion de l' Studento-Grupoj.

Per helpoj kaj kunlaboro de la samideanaro, ni obstine paŝos kaj pacience marŝos al nia celo, ke la nobla idealo tuthomara fine plenumiĝu.

La 8an de Novembro, 1924.

Tutjapana Federacio de Studento-Grupoj de Japana Asocio por la Ligo de Nacioj.

Studento-Grupo en Waseda Universitato, Tokio Imperia Universitato, Doŝiŝa Universitato, Keio-Gijuku Universitato, Kansai Universitato, Ĉuo Universitato, Meiji Universitato, Jokohama Komerca Kolegio kaj Nagasaki Komerca Kolegio.

III.

SERĈAS INTERNACIAN NEGOCADON

Ofte la U. E. A. delegitoj ricevas proponojn de fremdlandaj samideanoj pri komercado, ktp., kaj la jena de S-ro Paul Plate (Lärchenstr. 11, Elberfeld, Germany) ekzempligas kion ni pli kaj pli ofte povas atendi: Kara samideano,

Mi serĉas sinjorojn kaj firmojn, strikte reale kaj serioze, kiel reprezentado aŭ en alia maniere por fari komercadon en ĉiuj artikloj kiujn oni fabrikas en Germanujo, precipe de artikloj de fero kaj stalo (iloj, tranĉiloj, tondiloj, ktp.), maŝinoj, rubandoj, butonoj, fadenoj, garnajoj, kaŭĉukajoj, celuloidajoj, aluminaĵoj, emajlaĵoj, paperajoj, hemiaĵoj, ktp. Mi havas mem fabrikan.

Pri la referencoj aŭ garantioj por la komercaĵoj, mi estus je klarigo dankema.

La temo estas sole pri komercoj durantaj.

Procentaĵoj 5-10%.

Mia firmo konas sole la komercon severe realan.

Oni korespondas: esperante, germane, france, angle, hispane kaj ruse.

Atendante respondon de vi aŭ de la sinjoro, kiu deziras preni la reprezentadon, mi salutas vin kore,

Paul Plate.

IV.

"REKLAMO"

Commercial Esperanto to the front! The announcement of Vol. 1. No. 1. "Reklamo," an advertising journal, of which we have received a sample copy, suggests a forward step in the use of Esperanto as the language for international business. The copy is dated January, though for some reason or other the year is omitted. It has eight pages, 10½ x 12. It includes a commercial chronicle from fourteen different countries (largely concerning exports and imports); it lists in two pages commercial firms that use Esperanto; it has three pages of pure advertising (more than half of which concerns tobacco—interesting in the light of the next article (5)); and the price of this monthly journal is only one Swiss franc a year. The address is "VI Georgiev, str Skobeleva No. 38 Rusçuk (Bulgario)." We quote from its announcement:

"REKLAMO"n aperigas la bezonoj de nia tempo. La internacia komerco bezonas internacian lingvon. La mondo bezonas ŝparon de tempo kaj mono. "REKLAMO" disponigos siajn paĝojn al la tutmonda komercistaro, donante al ili komercajn informojn, artikolojn je komerca karaktero, konstantan rubrikon de firmoj uzantaj Esperanton en sia korespondado kaj ĉefe servos kiel speciala reklamjurnalo.

Por trafi pli grandnombran legantaron ni difinis prezon tute malaltan 1 sv. fr. aŭ egalvaloro por la tuta jaro. Komence ĝi aperos monate kaj en ok paĝoj sur bela papero sed kun tendenco de granda, eĉ tute senpaga komerca jurnalo, enhavanta ĉiujn fakojn de la komerca vivo. Sed, atingi plenan sukceson ni povos nur per la helpo de la tutmonda esperantistaro. Ni petas ĉiujn, kiuj deziras la ĝeneraligon de Esperanto en la tutmonda komerco helpi nin sendante al ni reklamojn, komercajn informojn pri sia lando kaj disvastigante la jurnalon inter la komercistoj. Danke ni akceptus ankaŭ konsilojn pri ĉio koncerne la jurnalon.

"Reklamo."

V.

VERDA KRUCO

Verkfolioj de Esperantista Tabakkontraŭula Asocio.

Amerika Esperantisto does not stand for any -ism other than Esperantism. Therefore in quoting from the anti-tobacco advocates we do so by way of giving news. Here is part of the message from this organization which was founded last season during the Vienna Congress:

Esperantistoj Ĉiulandaj!

Certe ĉiu Esperantisto estas nobla idealisto kaj montras simpatian por ĉio bono. Pro tio oni vere devas miri, ke ankoraŭ tiel multaj sopiras kiel sklavo de fumadpasio, de abomena kaj senindulga nikotin-malvirto. Do aŭskultu!

Ni amikoj de vivmaniero sentabaka skribis sur nia flago la rajton je freŝa aero. Ni volas iri tra la vivo kun klaraj okuloj, libera spirito kaj varma koro, ni volas sunon porti al domoj kaj cerbojn nebuligitajn pro tabakĝuo. Kiu deziras sanan junularon, li marŝas kun ni; ĉar la fumadmanio ekskuas la popolforton. La fumanto sence forblovas senfinajn milionojn da bona mono; kia giganta malŝparemeco! La nefumanto ne ĝenas la fumanton, sed la malo estas ĝuste. Ni batalas kontraŭ la perforto de la vero per senpensa malplimulto kaj disvastigas la vortojn de

la granda pensulo kaj poeto Goethe, ke "fumado signifas malica malĝentileco, impertinenta malsocietemo al ĉeestantaj personoj (precipe virinoj kaj infanoj), al kiuj la tabakfumado estas malkare, maloportune, malutile." Vere, tabako estas la mielroso de kulturo. Ĉu entute estas necese la fumpasio? Ne? Tiam ĉesu pli bone hodiaŭ ol morgaŭ. Kion Vi gajnos je freŝa aero kaj klara kapo, je forta volado, je bonega konscio ke Vi utilis al proksimuloj, — ĉio ĉi tio valoros pli ol kion Vi rifuzis. Ĉu Vi jam pensis pri malbeleco de forĵetitaj cigaredostumpoj pri grandegaj malutiloj, kiujn kaŭzis ĉiujare malsingardemaj fumantoj? Ĉu Vi bone fartas meze de tia societo? Do ĉesigu tiun senpensan kutimon, tiun superfluan balaston! Precipe ebligu sentabakan edukadon tre facilanime forlasis ilian devon.

Jam alvokas aŭstria kaj germanaj profesoroj de medicinaj fakultatoj la kuracistaron, tre serioze batali kontraŭ ĉi tiu rasoveneno, por ke iam estu ŝparota al la kuracistoj la riproĉo, ke ili dum la plej malfacilaj tempoj tre facilanime forlasis lian devon.

Miloj da eminentuloj kondamnas la tabakĝuon kiel kontraŭsocialan restajon de barbara tempo. Aliĝu al tiuj, batalu kun ni

Por la popolrajto je freŝa aero,
por liberigo el premanta sklaveco,
por libera kaj ĝoja vivmaniero!

Tabako, pipo, cigaro, cigaredo estas ĉenoj malhelpantaj la suprenradon de popoloj.

Kontraŭ la nikotinsklaveco!

Por popolbonfarto!

Informojn pri tabakkontraŭula movado volonte donas kaj rilatajn flugfoliojn kaj literaturajojn diverslingvajn petas

Esperantista tabakkontraŭula asocio (ETKA) Wien 69, Postfach, Austrio.

VI.

ESPERANTO AT THE FAIRS

Europe has "Fairs"—many of them. They are for the purpose of promoting trade. Delegates of the Universal Esperanto Association frequently receive notice of these fairs, and it is encouraging to see how more and more they are catering to Esperanto as a common tongue for visitors from other countries. The Frankfort Fair is perhaps the one that is most advertised through Esperanto; though the circulars we happen to have to quote from just now are those of Leipzig and Danzig. The former is an institution dating from the year 1268. Its spring meeting begins the first of March, too soon for this notice to be of more than of descriptive value. Here is a paragraph from the sheet sent as "Informo por la gazetoj," or what we Americans call a "release sheet."

Post la restarigo de pacaj tutmondaj ekonomiaj kaj komercaj interrilatoj la Leipzig-a Foiro travivis eksterordinaran, unikan evoluadon. Tio, kio karakterizas ĝin hodiaŭ estas la engrupa aliĝo de preskaŭ ĉiuj komercaj kaj teknikaj branĉoj, lasttempe ankaŭ de tiuj, kiuj ĝis nun ne estis aliĝintaj—en formo kaj grado, ke la Leipzig-a Foiro fariĝis vere universala kaj internacia. Diverslandaj nacioj jam hodiaŭ havas ĉi tie apartajn domojn aŭ specialajn kolektivekspoziciojn. La dumfoira komerca vivo estas tute kosmopolita kaj montras, ke la Leipzig-a Foiro estas la "mondfoiro."

The Danzig Fair is new. Last October occurred the second one, while the third will have occurred (Feb. 5-8) before we go to press. Here is a paragraph from the December circular:

Vi certe jam scias, ke la Danziga Internacia Foiro utiligis plej vaste Esperanton jam en nuna jaro. La foira estraro sendis la subskribinton kiel delegiton al la Universala Esperanto-Kongreso en Aŭgusto de nuna jaro al Wien kaj disponigis al la loka Esperanto-Asocio pli grandan ekspoziciejon, en kiu oni okazigis vastan Esperantoekspozicion. Entute pli ol 20,000 personoj vizitis kun plej vigla intereso tiun ekspozicion kaj multnombraj estas la novaj amikoj, kiujn ni varbis per tiu ekspozicio por nia afero.

VII.

ESPERANTO AND MEDICINE

From the Internacia Medicina Revuo we have the following appeal for interchange of courtesies:

Ni havas la honoron fari al la est. Administracio jenan proponon. Ni estas emaj anonci vian revuon ĉiumonate en nia revuo, se vi konsentos fari reciprokan anoncon de nia revuo. Internacia Medicina Revuo estas unu de la plejbone disvastigitaj organoj ĉar ĝi estas sendata al 35 diversaj landoj. Niaj abonantoj estas plejgrandparte medicinistoj, kiuj estas en la situacio aboni plurajn revuojn, eble ankaŭ la vian.

From the Japanese Journal of Dermatology and Urology, which appears to use Japanese and Esperanto, we believe the following has come in the name of its editor:

Por forpreni de ni, tutmonda medicinistaro, la ŝarĝon nenecesan lerni la diversajn malfacile ellerneblajn nacilingvojn kaj dediĉi la tiel ŝparitan tempon al la studado kaj esplorado de la medicino mem, mi deziras, ke oni akceptu Esperanton kiel la solan oficialan lingvon, ne nur en la internaciaj kongresoj, sed ankaŭ en la internacia medicino, t.e. oni ne rekonu la antaŭecon pri la laborajo, kiu ne estas verkita en Esperanto. (el mia letero skribita al francaj profesoroj D'Arsonval, Charles Richet kaj Fernand Vidal.)

From the world Esperanto medical association the following "Alvoko al ĉiulandaj kuracistoj kaj medicinistoj":

Ni insiste petas Vin energie propagandi por la "Teka." Ne ekzistu en la mondo iu ajn kuracisto aŭ medicinistudento, ne apartenanta al la "Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio." Subtenu laŭ Via eblo ĝin per libera laŭpova sendado de mono de tempo al tempo—por ke ni povu ekkomenci la necesajn aranĝojn, la antaŭmilitan vivon, kaj disvolvigadi. Sendu al ni Vian propran aliĝon kaj la adresojn de ĉiuj konataj de Vi kuracistoj kaj medicinistudentoj. Sendepende, sen nia perado, instigu ilin al aliĝo kaj laboro por la Teka. Pripensadu ofte pri sekvantaj demandoj: 1) Kion mi mem faru por la Teka? 2) Kiom da mono kaj kiom ofte mi mem povas sendadi por restarigo kaj sustentado de la Teka? 3) kiom da novaj anoj mi povus varbi por la Teka? 4) Kiamaniere kaj kiel ofte mi interrilatiĝu kun aliaj Tekanoj? 5) kiamaniere kaj kiom ofte mi interrilatiĝu kun la T. E. K. A. de Briquet (Lille) kaj kun la "Internacia Medicina Revuo" de Mézei (Budapest)? 6) Kiomfoje mi skribu aŭ traduku medicinajn verkojn, artikolojn aŭ referatojn? 7) Kiamaniere mi per miaj propraj fortoj aŭ iniciato ebligu aŭ plifaciligu le eldonadon de medicinaj verkoj, artikoloj, vortaro aŭ aliaj eldonajoj? Ĉu per propra laboro, ĉu per monsubtenado? Ne temas nur pri plendoj, kritikoj, proponoj aŭ konsiloj—sed samtempe ankaŭ pri la propra sendependa efektiva agmaniero. Pripensadu ĝin laŭ la principoj: "Viribus unitis" kaj "Nulla dies sine linea!"

Aliĝojn, adresojn de kuracistoj kaj studentoj, demandojn kaj proponojn sendu (legeble skribitajn) al adreso de: D-ro Maksimiljano Blass-

berg—Krakow (Pollando)—Starowiślna 18, aŭ D-ro Milan Crlenjak—Zagreb (Jugoslavio)—Palmotiĉ ul. 20/I. La mondonacojn (plej bone en naciaj monbiletoj) sendu al: D-ro Sós—Wien I (Aŭstrio)—Tuchlaŭben 18.

La apotekistoj kaj farmacistudantoj estas tutkore akceptataj en la T. E. K. Asocio, kaj ankaŭ anoj nur aprobantoj.

It is significant that this medical association is preparing a technical dictionary for medical Esperanto, which is ready in manuscript for final corrections or may already have gone to press.

VIII.

CONFERENCE FOR SCIENCE AND TECHNOLOGY, MAY, 1925.

Nia eminenta samideano, Rollet de l'Isle has sent notice of the interesting meeting to be held in Paris in May, and would have us broadcast it and also help by sending him the addresses of individuals and organizations that favor the use of Esperanto in scientific and technical affairs. He names the classes of people that are being invited:

Sciencaj kaj teknikaj oficialaj Institucioj; ekz. en Franclando, la Ministerioj de publika instruado, de la Maristaro; la Supera Lernejo de Elektrotekniko, k.t.p.

Sciencaj Asocioj privataj; ekz en Franclando, la Franca Asocio por progreso de Sciencoj; Societo de Civilaj Inĝenieroj, ktp.

Grandaj firmoj kaj Industriaj Kompanioj; ekz en Franclando la Fervojaj Kompanioj, Fermo Michelin, k.t.p.

Scienca kaj teknika Gazetaro.

Eldonistaj firmoj Sciencaj kaj teknikaj.

Bonvolu sendigi al mi tiujn sciigojn kiel eble baldaŭ, kaj ricevi, kun miaj antaŭdankoj, Estimata Sinjoro Prezidanto, miajn plej korajn salutojn.

ROLLET de l'ISLE, Provizora Prezidanto de I. S. A. E., 35, rue du Sommerard—Paris—France.

ESPERANTO LISTED BY THE U. S. NAVY

Esperanto is recognized as a living tongue by the United States hydrographic office says the "Pittsburgh Sun." It is one of the languages in which the directions are printed in "bottle papers," which are given mariners to be cast overboard at sea in order to observe the direction and strength of ocean currents. The bottles are picked up by people of all nationalities, and the directions for the return of the papers are therefore printed in eight languages, one of which is likely to be spoken or understood by any civilized dweller along the Seven Seas. The languages are English, French, German, Dutch, Italian, Spanish, Portuguese, and Esperanto.

ANEKDOTO

Knabeto iris unu tagon al la kuracisto, kaj diris:

"Doktoro, mi opinias ke mi havas la morbilon, sed mi pensas ke mi povos ĝin gardi ke neniu ĝin sciu."

La kuracisto ne komprenis; li aperis konfuza.

"Nu," daŭrigis la knabeto, "Kiom vi donos min, se mi iras al la lernejo por disĵeti ĝin inter ĉiuj la geknaboj?"

Trad. M. E. H. L.

IX.

BOOK REVIEWS

By Edward S. Payson

E. Coué "La regado de si mem per konscia aŭtosugesto." Esperanta Biblioteko Internacia No. 33 — Esperanto-Verlag Ellersiek kaj Borel. G. M. B. H. Wilmsstrata 5. Berlin S. W. 61 Germanujo. 56 paĝoj, prezo 0.30 Solemarkoj. Esperantigis J. Borel.

This is an interesting addition, of real value, to the teachings of Coué. The introduction written by the translator, J. Borel, is clearly written and is a strong argument in favor of the methods of Coué. The book contains a translation of a lecture given by Coué in France and other countries. It states in simple language the theory of autosuggestion and the use that he makes of it as a means to health, and even success in the affairs of everyday life. Coué states that it is not one's will, but one's imagination that acts upon one's condition. He gives an example to verify his claim. "Ni supozu, ke ni metas sur la teron tabulon de 10 metroj de longeco kaj 0.25 metro de larĝeco; estas klare, ke ĉiu homo estos kapabla, iri de unu fino de l' tabulo al la alia, ne metante la piedon sur la teron. Sed ni ŝanĝu la kondiĉojn de la eksperimento kaj supozu, ke la tablo estas metita tiel alte, kiel la turoj de katedralo, kiu do kuraĝos marŝi eĉ unu metron sur tia mallarĝa vojo? Ĉu vi, kiu min aŭskultas? Kredeble ne, apenaŭ post du paŝoj vi komencus tremi kaj malgraŭ ĉiuj volaj klopodoj vi neeviteble falus malsupren.

Kial vi ne falos, se la tabulo kuŝas sur la tero kaj kial vi falos, se ĝi troviĝas alte? Nur tial, ĉar en la unua okazo vi imagas ke estas al vi facile, iri ĝis la fino de la tabulo, dum en la alia vi imagas, ke vi ne povas. Vi rimarku, ke spite de via volo, se vi imagas, ke vi ne povas, estos al vi absolute neeble, tion fari."

The entire book must be of great interest to the followers of Coué, and it is well worth the consideration of those who are not informed as to his teachings. The translation is clear and delightfully simple. Read this book, you who believe, and those who do not believe may be convinced that there is a power within ourselves whereby there may be overcome the ills that the flesh is heir to.

E. S. P.

Index to English Words contained in the Esperanto-English Dictionary of Edward A. Millidge. Compiled by George Gordon, F. B. E. A. (Gego) translator of "Kara Panjo" Komedioto; "La Kamena Angulo," "Lia Lasta Ŝanco" and "Alegorioj de la Naturo." 160 pages cloth, 6½ x 7, price 50 cents. Stead's Publishing House Bank Buildings, Kingsway, London.

In the preface Mr. Millidge says: "Mr. Gordon being an experienced translator having found the Esperanto-English Dictionary very helpful in his labors, largely owing to its word comparisons and its wealth of illustrative phrases and sentences, it occurred to him that an **Index** to all the English words contained therein would be of great value to both student and translator. In this opinion he was confirmed by the enthusiastic welcome accorded to a specimen page of the work printed in **The British Esperantist** of 1918. Since then the Index has been thoroughly revised and brought up to date by me, in accordance with the **Fifth Edition of the Dictionary.**"

This **Index** will prove of great interest to all English users of Esperanto, as it will at a glance suggest the suitable Esperanto word or

words for the idea to be expressed. The Fifth edition of the Esperanto-English Dictionary of Millidge and the English Index are a library in themselves.

E. S. P.

Robert Reitzel. Aventuroj de Malspertulo, translated by Dr. Tobias Sigel. Esperanto office, Detroit, Michigan, U. S. A., 32 pages 7 x 5 price 1.20 goldmark, published by Verlag Ellersiek and Borel G. M. B. H. Berlin and Dresden.

Robert Reitzel was without doubt a man of rare ability as a poet and orator and also a prolific writer of prose. He and Dr. Sigel were warm friends, Dr. Sigel being his physician during his long sickness. The book is in part the story of the author's coming to this country, without friends, and very little money. He humorously describes his adventures while seeking employment and in prose poetry describes his love of the beauties of the Hudson River. He also adroitly touches upon capitalists and labor. The well told story is full of interest and more than well worth reading. The translation into Esperanto is praiseworthy, clear, simple, easily read and free of riddle compounds. The book is charming because of the matter contained and the excellence of the translation. Reading Esperantists will enjoy reading it and can procure it from Dr. Sigel. Support Esperanto literature, especially if the product of our own people.

E. S. P.

Poŝkalendareto por Junaj Esperantistoj 1925, Kompilis Rudolf Pivel, Trautenaŭ. Prezo: 0.50 svisaj frankoj: Eldonis Tutmonda Esperanta Asocio Junulara. Wedellstrate 17. Leipzig, Germanujo.

